

EKO 2023



Nia aganto pri
instruado kaj
progreso

Pensu globe, Agu loke! Por la Landa kaj Faka Laboro

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komuniko



EKO 2023 / 39. Julio 4, 2023

Kun partneroj UEA, ILEI, IFEF, UMEA, IKEF, LIBE kaj ELF-AREK

Kunlaborantoj (lingva kontrolo): Rob Moerbeek, Elda Doerfler, Gbello Koffi.

Pezo: Word nur teksto: 40 KB; Ĝia sveltigita PDF: 310 KB. Alkroĉaĵo Aruŝa: 243 KB. Sume: 593 KB.

temas nur pri PDF, kiun SMG mem alkroĉis. La pezo de aŭtomate kreitaj PDF ne estas anticipe koneblaj.

Himalaja invito – strebu pli alten

Nepala Esperanto-Asocio ĝojas anonci la 14-an Internacian Himalajan Renkontiĝon 2024 por konigi sian landon al alilandaj esperantistoj. Apenaŭ ekzistas lando en la mondo kiu povus rangi samnivele kun Nepalo rilate al natura, lingva, etna kaj kultura diverseco. Ni bonvenigas ankaŭ homojn kiuj volas komenci lerni Esperanton dum la Renkontiĝo. La programo estas planita por ke ĝi taŭgu al ĉiuj aĝgrupoj. Vi loĝos en bonkvalita hotelo en Katmanduo kaj en komfortaj gastejoj aŭ tendoj dum la piedvojaĝo. Ĉiuj manĝokostoj kaj aliaj similaj kostoj estas inkluzivitaj en la aliĝkosto, sed ne asekuro. Multaj niaj servoj estas farataj de nepalaj esperantistoj.

Vi pasigos la unuajn kaj lastajn tagojn en la valo de Katmanduo. Ĝian riĉan kulturen pasintecon atestas la monumentoj, notinde tiuj de la plej grandaj urboj, Katmanduo, Bhaktapuro kaj Patano. Tie vi povos vidi kiel hinduoj kaj budhanoj restas fidelaj al siaj jarcentaj tradicioj

malgraŭ multflanka modernigo de la valo. La ĉefa parto de la Renkontiĝo estos busvojaĝo al la celo kaj piedvojaĝo en la regiono je preskaŭ 300 kilometroj nord-okcidente de Katmanduo. Dum la marŝado vi trapasos multajn lokojn plenajn de vidindaĵoj, inkluzive Pokhara (la plej fama turisma loko), Kade, Forest Camp (arbara kampo), High camp (Plej alta kampo). Ĉe la horizonto estos mondfamaj montoceloj de Nepalo, kreantaj majestajn vidojn de Himalajo.



La piedvojo inter Dampush kaj High camp estas plejparte tra neloĝata rododendro-arbaro. La tereno tie estas kovrita de arbaro kaj punktita de diversaj sovaĝaj floroj, inter kiuj estas malsamaj specioj de rododendro, la nacia floro de Nepalo. Vi ankaŭ ĝuos vidojn de nigraj simioj, cervoj, moskuloj kaj diversaj specioj (pli ol 250) de montaraj birdoj. Ekde la komenco vi povos observi la vivon kaj kulturon de etnaj popoloj: la Gurungoj kaj Magaroj. Tiuj ĉi etnoj, oni opinias, devenis de Mongolio kaj Tibeto, kaj ili estas konataj kiel senafektaj kaj honestaj. Plejparte ili estas tradicie terkultivistoj kaj bredistoj. Ili havas distingajn lingvojn, domstilon, vestojn, ornamojn kaj kutimojn, kaj estas aparte famaj pro siaj ravaj dancoj kaj muziko. Plejparte ili sekvas la budhismon.

Mardi Himal estas unu el la popularaj piedvagadaj cel-lokoj de la masivo de Annapurna kaj Ma. Ĝi estas facile atingebla, sed piedvagantoj devas marŝi plejparte aŭ supren aŭ malsupren. La programo sekvas la ĉefan vojon. Vi trairos pitoreskajn kampojn de rizo, abundajn arbarojn de rododendro kaj belajn vilaĝojn plejparte loĝatajn de Gurungoj kaj Magaroj. Pintoj de Annapurna, ekzemple Annapurna Sudo (7.219 m) kaj seso da pliaj pintoj iĝos videblaj ekde la tago de la marŝado.

Kotizo: 1050 eŭroj por 12-taga ekskurso, restado en bonakvalita hotelo, tri manĝoj ĉiutage, enirpagoj en diversaj lokoj kaj transportado. Enirpago en Mardi Himal kostas pli ol 60 eŭrojn (Kontaktu NEspA por scii la detalan programon.

Resume, ree pri Sumoo: partoprenu en julio

Sumoo estas internacia legprojekto de Esperanto-libroj. Nuntempe averaĝe 300 homoj el 35 landoj legas Esperanto-librojn 6 fojojn jare po 15 tagoj. Vi simple sendu vian datumon pri vi kaj pri via legado, kaj komencu legi ekde la 9-a de julio. La julia, 82-a Sumoo komenciĝos la 9-an de julio kaj daŭros dum 15 tagoj. Mi atendas vian aliĝon. Por pliaj informoj vizitu nian retejon: <http://www.esperanto-sumoo.pl/>

HORI Jasuo, 371-0825 Japanio, Gunma, Maebas[^]i, Ootone 2-13-3
Retadreso: horizonto@r.water.sannet.ne.jp

Aminda en la nacia tago de Madagaskaro

La ELSENDO N°132 de Aminda Radio Esperanto aperas en la nacia tago de Malagasio. La unua parto de la programo proponas al vi nekrologon pri la forpaso de nia amikino Lala Justine antaŭ unu monato. La dua parto de nia artikolo pri la «zazavavindrano» raportas al vi la sekvon de tiu fenomeno de feina estaĵo ĉe akvo en nia lando. Kaj ni dediĉas kanton de Kjara Raggi al nia forpasinta amikino Lala. Ni ne forgesis aldoni kelkajn novaĵojn de la kuranta monato.

<https://youtu.be/EV9pnZNjXc>

Henriel FIDILALAO, Madagascar

Hungario: HEA protektas libro-kolekton

La prezidanto kaj vic-prezidanto de la hungara landa asocio HEA laboris por forpreni kaj protekti multajn librojn kaj revuojn, kolektitajn de SMG tra plena vivo de Esperanta kolektado. La prezidanto estas s-ino Gyöngyi Mézes (Perlo Miela) kaj la vic-prezidanto s-ino Lilla Domsits. La libroj iris aŭte al nova sekura storejo. Inter la libroj estis 'La arto kune Labori' (riĉa kolekto de eseoj honore al d-ro Humphrey Tonkin.), 'Abunda Fonto' de István Szerdahelyi kaj Ilona Koutny, 'Svejk', la verko de Jaroslav Hašek, 'Arto kaj Naturo' de Reto Rossetti, la plej freŝa eldono de la

'Manlibro pri Instruado' kompilita de Katalin Kovats, kaj multegaj pli (ja aŭtopleno).
Pliaj skatoloj estas nun pakataj por dua forporta evento.

Ekzamenaj atingoj en Serbio

Sabate, la 24-an de junio, Serbia Esperanto-Ligo okazigis ekzamenojn en Beogrado por la kursanoj kiuj finis 7-monatajn retajn kursojn de Esperanto. La unua grupo ekzameniĝis je niveloj:

- A – komencantoj, skribe
- A – komencintoj, parolige
- B – prosperiga.

Gratulojn al la ses kandidatoj kiuj sukcese trapasis la ekzamenojn:
Bojan VELIČKOVIĆ el la grupo A1,
Vuk MLADENOVIĆ, Danijela PETROVIĆ, Blanka LASLO,
Lorijan POPI kaj Dejana RAKIĆ el la grupo A2. Lorijan ekzameniĝis



ankaŭ je nivelo B. Grandan dankon al la teamo de instruistoj kiuj realigis la kursojn (en alfabeto ordo): Aranka LASLO, Zlatoje MARTINOV, Živanko NOVAKOV, Radojica PETROVIĆ kaj Jovan ZARKOVIĆ. Dankegon ankaŭ al Nedeljka LOŽAJIĆ kaj al la Biblioteko „Milan Budimir” pro la disponigo de ejoj por la ekzameno. Aŭtune ni atendas la duan grupon de kursanoj por ekzameniĝi ĉeeste.

Jen la **foto-albumo pri la ekzamentago**:

<https://drive.google.com/drive/folders/1cpqmqngG-8wL8dBHWLmyXYca4EEtk8EqT?usp=sharing>

Pia – plia kurso en Danlando

La redaktoro de edukado.net informas vin ke aldoniĝis nova ero ĉe la Kursejo.

Nomo: Pia instruas

Gvidantonomo: Pia Wettergren

Tipo: Nova movada kurso

Loko: Albertslund, Danio

Aldoninto: Filuro

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: <https://edukado.net/kursejo?kid=27538>

Kurso apud la Esperanto-urbo

Nomo: Volkshochschule Göttingen-Osterode (VHS)

Gvidantonomo: Zsófia Kóródy

Tipo: Nova lerneja kurso

Loko: apud Herzberg am Harz, Germanio

Aldoninto: herzbergcentro

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: <https://edukado.net/kursejo?kid=27539>

Nomo: Paroligaj kursoj kun www.edukado.net (A1-A2)

Gvidantonomo: Katalin Kovats

Tipo: Nova movada kurso

Loko: Torino, Italio. Aldoninto: Katalin

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: <https://edukado.net/kursejo?kid=27540>

Orient-Afrika seminario prepare al Aruŝa

Jen ni sukcesis reakiri la mistere malaperintan raporton pri la prepara kunsido en Burundo por prepari la vojon por sukcesa UK en Aruŝa en julio 2024. Ĝi nun estas alkroĉita. Krome, la perdo spronis la kreemon de la EKO-komunikisto, kiel vi konstatos el la suba literatura strebo.

ILEI konigas sin per la ĉina radio

Temas pri oficiala forumo organizata de Ĉina Komunikila Grupo, kies parto Ĉina Radio Internacia nun estas. La temo estas 'Kulturaj Interŝanĝoj kaj Eo-disvastigo en la Nova Epoko.' Dato: la 29-a de julio, ekde 11:00 UTC. Ahmad kaj mi estas invititaj paroli nome de ILEI kaj aperas kiel kunorganizantoj.

Kvankam ni parolos mallonge, estas bona ŝanco de granda videbleco. Ahmad parolos pri tio, kiel Esperanto povas helpi egalrajtan edukadon. Mi parolos pri la projekto de la 30 Oraj Horoj, la prestiĝa premio pri kvalito de instruado, kiun ĝi ricevis de Erasmus kaj INDIRE, kaj mia libro pri lernofaciliga Esperanto, menciante precipe la eksperimenton de Jennifer kaj Alan Bishop kaj la korespondadon inter miaj ĉinaj studentoj kaj italaj kaj francaj lernantoj.

Alessandra Madella

Orienta Afrika Seminario de Esperanto en Burundo

Dum ĉi tiu semajno okazis Orient-Afrika Seminario kie partoprenis Burundanoj, Kongolandoj kaj Tanzanianoj, Gesperantistoj. La seminario estis gvidita de Prof. D-ro Francesco Maurelli en du tagoj merkredo la 14 ĝis ĵaĵdo la 15-a de junio 2023.

La temo de la seminario estis: PREPARADO DE UK 2024 en Aruŝa Tanzanio. Post la seminario, la partoprenantoj havis tempon por diskuti la aferojn kiuj povas agi en la UK kaj ili proponis alprenotajn solvaĵojn. Ni dankas al:

- Prof. Dr. Francesco Maurelli, kiu gvidis la seminaron
- Partoprenantoj (Burundanoj, Tanzanianoj kaj Kongolandoj)
- La Landa Asocio de Esperanto en Burundi (ANEB) kiu gastigis la seminaron. Burundo ne estis elektita hazarte, ĝi estas pro sia grandega nombro da esperantoj en Afriko.



La balado de netroveblo

Objektoj ofte ne troveblas

Elteno mia ege feblas

La mankon markas mia ploro

Kun postresto de doloro.

Mia komputilo karnivoras

Dokumentojn ĝi avida voras

Egale PDF, simpla teksto aŭ de Word-o

Malperas en malordo.

Bezonata de Hermione G. la sako

Ja magio estas ŝia fako

Klare, sorĉado estas ŝia forto

Sekreta diro de la magia vorto

Sufiĉas, ke el la sako saltu

la mankaĵo! Ĝoju kaj ekzaltu!

Tia sako en mia posedo

Estus mia gajn-rimedo!

===== 1170 vortoj =====

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.

Por pli da informoj vidu ĉe: <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>>.: La kolekto de EKO: troveblas ĉe

<https://www.ilei.info/agado/EKO.php> por 2023 (ĝis 30).

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolisto.